

INDEKSO

Applebaum 106	Jespersen 94
Aspekto de verboj 98, 105	Kotzin 105
Baghy 106, 107	Lingwe Uniwersala 96
Bastien, Gen. 106	Luyken 106
Beaufront, de 101	Mayor, Prof. 102
Butler, M. C. 106	Occidental 106
Collinson, Prof. 94, 105, 106	Slavismoj 103, 104
Couturat 95	Stojan 93, 95, 99, 105, 106
Drezen 99, 104, 105, 107	Svahili-lingvo 102
Eneido 102, 106	Universo 105, n. 1, 2
Grabowski 106	Volapük 100, 105
Greka lingvo 105, 106, 108	Volapukismoj 100, 101
Hankel, Marie 93	Wahl, de 106
Hebrea lingvo 105, 106, 109	Wajsblum 105
Hungara lingvo 105	Waringhien 105, 106, 107
Ido 105, 106	Wüster 107
Japana Lingvo 106	Zakrzewski 105
Javal 101	Zamenhof, Lidja 106

FREMDAJ VORTOJ CITITAJ

<i>germanaj</i>	<i>francaj</i>	<i>anglaj</i>
(be-)liefern 105	cousine 103	cuz 103
brühen 109	dont 97, 105	drink 101
dreschen 102	étui 105	forget 102
Frau 103	jusque 105	thrash 102
Fräulein 103	malheureux 102	<i>rusaj</i>
Fron 103	malsain 102	kadilo 105
geschlachtet hätte 106	peser 101	pravilo 105
irgend ein 105	plus 101	<i>polaj</i>
je 101	tout-de-suite 105	gdzie 97
Prinzessin 103	tricoter 102	jedzyna 103
Schlüssel 105	<i>latinaj</i>	wyszyscy 97
trinken 101	dum 107	<i>rus-pola</i>
(ver)achten 102	male sana 102	bez 99
vergessen 102	insana 102	<i>gotaj</i>
während 107	<i>svahili</i>	gotaj
zielen 105	fumba 102	frauja 103
<i>jida</i>		
Rebbedzin 106		

de D. B. GREGOR

408.92 : 415.411.1 : 412

1. KION LA UNIVERSALA VORTARO VERE INSTRUAS
PRI LA GRAMATIKA KARAKTERO DE LA
ESPERANTAJ RADIKOJ

Kiel sciante, unu el la pruvoj uzataj de tiuj, kiuj subtenas la kategoriecon de la Esperantaj radikoj, estas la fakto, ke la signifoj donitaj en U.V. en la kvin naciaj lingvoj klare montras, ĉu temas pri substantivo, verbo, adjektivo, aŭ adverbo¹⁾. Se tio ne sufiĉas - kaj estas²⁾ kiuj asertas, ke la naciaj lingvoj, ne havante „radikojn”, devis aperi en iu difinita formo, kiu do pravas nenion -, ni povas aŭskulti Zamenhof mem, kiu, uzante frazojn³⁾, kia „mi intencis doni al la radiko signifon verban” ŝajnas ne plu lasi dubon, ke almenaŭ laŭ intenco li dotis ĉiun Esperantan radikon je iu gramatika karaktero. Ĉi tiu dotado tamen ne okazis laŭ ia ajn antaŭfiksita plano. Vane ni serĉus en U.V. ian kriterion, kiu gvidis la distribuon de la kategorioj. La malfeliĉa paro *broso/kombilo* - fonto de tiom da larmoj - sufiĉas per si por montri, ke la elekto de la kategorio okazis tute hazarde. Kiel de *Saussure* atentigis en eble ne sufiĉe rimarkita⁴⁾ frazo, la gramatika karaktero de ĉiu radiko „rezultas nur de arbitra decido de Zamenhof mem”.

Oni riproĉas al Esperanto multajn arbitre elpensitajn erojn; sed la plej arbitra el ĉiuj, ĝuste pro tio, ke ĝi eĉ ne estas „elpensita”, estas la disdivido de la radikoj inter la gramatikaj kategorioj.

Ĉi tiu iom malagrabra fakto ŝuldiĝas parte al tio, ke la Esperanta leksikono estas kreita nek en unu sola fojo, nek de unu sola homo. Pli ol unu cerbo naskis la U.V. Multaj el ĝiaj vortoj devenas, ne el la kabineta laboro de Zamenhof, sed el la ĝistiam literaturo, kian Zamenhof trovis ĝin en gazetartikoloj kaj libroj verkitaj per diversaj manoj. Neeviteble do, la radiko trovita havis la kategorion kiun necesigis la frazo, kie ĝi la unuan fojon estis uzata⁵⁾. De tio la ŝajna kaprico kiu prezidis la vortfaradon. Ne tiom la arbitro de Zamenhof, kiom la hazardo de la unua uzo, decidis al kiu kategorio apartenos radiko.

Io tamen arbitra restas en la U.V. Se ni atente ekzamenos ĝin, ni trovos, ke iuj radikoj aperas en pli ol unu formo. Post la 13 verbaj radikoj *Flor, gut, honor, kaŭz, kost, not, pik, pren, rul, sem, strek, teg, vest*, estas aldonita la radiko kun la finaĵo -o; kaj ke temas ne pri simpla substantivigo de verbo, sed pri sendependa vorto, estas evidente el tio, ke 5 el la substantivoj havas signifon aŭ neniel aŭ malmulte rilatantan al la verbo: *noto, piko, preno, rulo, tego*. Unu fojon la aldonita substantivo estas kunmetaĵo: *sidi/kunsido*. Unu fojon la aldonita formo

estas adjektiva: *perfidi/perfida*. Unu fojon du formoj estas aldonitaj: *okazi/okazo/okaza*.

Simile estas pri 11 substantivaj radikoj: *fum, nom, sel, silab, stan, tambur*, estas kaj substantivaj kaj verbaj (sed tio estas malpli grava, ĉar la senpera verbigo de substantivoj estas unu el la grandaj avantaĝoj de Esperanto⁶⁾); sed ni trovas ankaŭ la parojn: *spezo/elspezi, enspezi; sumo/resumi*; kaj *mistero/mistera; partio/partia; publiko/publika*.

Pli komplika, sed eble pli signifa, ol ĉi tiuj ekzemploj estas tiuj kazoj, kie la difinoj en la naciaj lingvoj ne estas gramatike homogenaj. Inter la anglaj difinoj substantivo aperas kvarfoje post tio, kio laŭ la aliaj lingvoj estas verba radiko (*bru, kov, rifuĝ, venĝ*); dufoje verbo post substantiva radiko (*spez, trikot*) kaj unu fojon adjektivo post substantiva radiko (*ver*). Estas tre malverŝajne, ke ĉiuj tiuj ekzemploj devenas de nesufiĉa kono de la angla lingvo, kiu, kiel ni vidos, evidentiĝas aliloke. Simile *sufiĉ* estas adjektiva en FA, sed adverba en GRP; *riverenc* estas substantiva en FAG, sed verba en RP; *stamp*⁷⁾ estas verba en AGRP, sed substantiva en F; *prunt* estas verba en GRP, sed adjektiva en A kaj adverba en F; *supr* estas adverba en FGRP, sed signita de *Zamenhof* mem kiel adjektiva en A, kaj sek-vita de la substantivo *supro*.

Kion oni rajtas dedukti el ĉio ĉi? Ŝajnas al mi, ke la konkludo estas neevitebla: Esperantaj radikoj havas ja gramatikan karakteron, sed kelkaj el ili povas aparteni al pli ol unu kategorio. Ĉi tiujn ni povas nomi hibridaj radikoj. La graveco de ĉi tio estas, ke ĝi permesas al ni, ne plu rompi la kapon pri radikoj kiel *korekt-*, ĉu ni devas diri *korekti* (el verba radiko) aŭ *korektigi* (el adjektiva radiko). Se ĝi estas radiko hibrida, tiam ni povas korekte diri, ke la unua estas korekta kaj ne bezonas ke vi korektu ĝin.

S-ro M. C. Butler⁸⁾ jam proponis ĉi tiun solvon por la radiko *korekt-*. Mi volis ĉi tie sugesti, ke la tuta U.V. pravigas tiun teorion. La fleksebleco de Esperanto etendas sin ankaŭ al la gramatika kategorio de la radikoj.

¹⁾ La unua kiu uzis tiun ĉi argumenton estis Boirac, antaŭ la Delegacio en 1907 kaj en la Antaŭparolo al sia Vortaro. Sekvis lin de Saussure (1910). ²⁾ W. Bailey (vidu *British Esperantist* 1954/46) kaj Drezén, Skizoj pri teorio de Esperanto pp. 49-50. ³⁾ O.V. p. 539. ⁴⁾ La Vortteorio en Esperanto p. 16 (1914). ⁵⁾ Ĉi tio ŝajnas rajtigi la interesan proponon de Setälä faritan en la Internacia Somera Universitato en Bologna 1955: se vorto troviĝas en tekstoj pli ol 5 fojojn el dek kun la sama gramatika finaĵo, oni povas atribui la radikon al tiu gramatika klaso. ⁶⁾ Kp. Kalocsay, Lingvo, Stilo, Formo p. 45: „Ido mortis, ĉar ĝi eliminis la senperan verbigon de substantivoj kaj adjektivoj”. ⁷⁾ Kp. la respondon de Zamenhof al Cart (O.V. p. 538): „Stamp’ povas esti egale bone tradukita per verbo kaj per substantivo.” ⁸⁾ *British Esperantist* 1953/105.

2. KIO ESTAS ERARA EN LA ANGLA SEKCIO DE LA U.V.

Zamenhof mem konfesas al ni, ke lia scipovo de la angla lingvo sufiĉis nur por legi, estante tute teoria¹⁾; kaj embarasitaj angloj ofte devas bedaŭri, ke li ne scipovis ĝin iom pli intime²⁾. Neeviteble do, inter la anglaj difinoj de U.V. troviĝas kelkaj, pri kiuj necesas fari averton. La studanto de la angla lingvo ne povus fidi je la tie donitaj anglaj vortoj. Pro tio ŝajnas al mi dezirinde, ke anglo altiru atenton al tiuj vortoj, kiuj ne akordas kun la ordinara angla lingvo-uzo.

Ni povas klasifiki jene:

1. Difinoj kompletigeblaj per vorto pli kutima kaj pli simila al la Esperanta:

acid	<i>aldonu</i>	acid	garanti	<i>aldonu</i>	guarantee
admon	„	admonish	gargar	„	gargle
aren	„	arena	gurd	„	hurdy-gurdy
autun	„	autumn ³⁾	hak	„	hack
bastion	„	bastion	iniciat	„	initiate
drapir	„	drape	liken	„	lichen
fervor	„	fervour	restoracio	„	restaurant
			vanilo	„	vanilla

2. Duopa difino, kies unu parto ne trafas:

buk	<i>forstreku</i>	latch	rimed	<i>forstreku</i>	remedy ⁴⁾
bukl	„	buckle	skabi	„	wastings
flirt	„	flirt	solv	„	loosen

3. Vortoj ne-ekzistantaj:

althee (*alte*); perpendicle (*pendol*). Anstataŭigu resp. *marshmallow* kaj *pendulum*.

4. Arkaikaj vortoj:

azot	<i>por</i>	nitrogen (azoto).	datura	<i>por</i>	thorn-apple
marchpane	„	marzipan (marcipano).			(dato)
muskin	„	titmouse (paruo).	extravagate	„	wander
chine-bone	„	vertebra (vertebro).			(vagi)
chapiter	„	capital (kapitelo).	cookey	„	cake (kuko)

5. Rektaj eraroj:

*dresi	dress, make straight (rektigi)	<i>anstataŭ</i>	train
*ekspozicio	exposition (klarigo)	„	exhibition
enui	annoy, weary (ĝeni)	„	grow weary, be bored
*fabriko	fabric (ŝtofo)	„	factory ⁵⁾
festi	feast (festeni)	„	celebrate

indulgi	save (ŝpari, savi)	„	spare, be lenient
kaldrono ^{a)}	kettle (bol kruĉo)	„	cauldron
kartono	pap (pastro)	„	cardboard
kaŝtri	cut, curtail (tranĉi)	„	castrate, geld
keglo	keel (kilo)	„	skittle
kloŝo	bell (sonorigilo)	„	bell-glass, cloche
*konkurso	concourse (homamaso)	„	competition
kruro	thigh ⁶⁾ , (femuro)	„	leg
kvitanci	acquit (absolvi)	„	receipt
*lardo	lard (porkograso)	„	bacon
*loĝio	cabin, lodge (kabano)	„	box (theatre-)
lorno	perspective glass(?)	„	telescope
manovri	work a ship, take measures	„	manoeuvre
nete	net (sentare)	„	in fair copy
malneto	foul copy	„	rough copy
*oferi	offer (proponi, oferti)	„	sacrifice, offer up
opinii	mean ⁷⁾ (signifi, voli diri)	„	think
pargeto	pit (partero)	„	parquet
parter	ground-floor (teretaĝo)	„	pit
pego	woodpeck	„	woodpecker
petoli	be petulant, (esti nerva)	„	be mischievous, be arch
plado	plate (telero)	„	dish
pleto	teaboard	„	tray
*pretendi	pretend (ŝajnigi)	„	claim
pudelo	spaniel ⁸⁾ (spanjelo)	„	poodle
*rento ^{b)}	rent (lupago)	„	income ^{b)}
*rimarki	remark (rimarkigi)	„	notice
salono	saloon (trinkĉambro)	„	drawing-room
*sentenco	sentence (frazo)	„	maxim, apho- rism
sopran	descant (soprana akom- pano)	„	soprano
spezo	spend (elspezi)	„	turnover
stipo	broom (genisto)	„	feather-grass
stuki	parquet (pargeti)	„	stucco
*resumi	resume (repreni)	„	sum up
talio	tally (registro)	„	waist, figure
tremolo	asp (serpento)	„	aspen
trikoto	cudgel (bastonego), knit (triki)	„	jersey, cardigan
*triviala	trivial (negrava)	„	vulgar
vato	wad (dika fasko)	„	wadding

vestiblo	floor (planko, etaĝo)	„	entry-hall
*veŝto	vest (subĉemizo)	„	waistcoat
*vikario	vicar ⁹⁾ (paroĥestro)	„	deputy
vino	vine (vinberujo)	„	wine

*falsa amiko!

¹⁾ Waringhien, *Letero* 92, p. 111. ²⁾ Ne nur angloj foje embarasiĝas, laŭ *British Esperantist* 1952/129. ³⁾ „Fall” estas usona, kiel ankaŭ *labor kaj color*. ⁴⁾ Spite de Millidge (kaj Delfé Dalm a u, „Dialekto, Dialektiko” p. 56 — La Redaktoro). ⁵⁾ Iuj (inkl. Millidge) uzas ĉi tiun radikon kiel verban, do diras *fabrikejo*. ⁶⁾ La alia donita signifo *shank* estas iom arkaika aŭ teknika kaj rilatas nur la parton, de la genuo al la piedo, t.e. pli bone estas tradukata per *tibio*. ⁷⁾ Sendube sub la influo de la germana. ⁸⁾ La vortaroj donas ambaŭ signifojn por la franca *barbet*. ⁹⁾ En tiu ĉi senco nur eklezia, rilate la Papon, Vikarion de Dio.

Notoj de la redaktoro:

^{a)} Tre povas esti ke diversnacianoj uzas ĉi tiun vorton por malsamaj objektoj. Kredeble la plimultaj nederlandanoj — kaj, kiel mi nun komprenas, kredeble malprave, uzas ĉi tiun vorton kaj komprenas ĝin, kiel la nederlandlingvan „ketel”, — vorton kiu en la mastrumo signifas metalan vazon kun kovrilo kaj verŝtubo kaj kun tenilo, plejofte turnebla, ĉe la supro. Tia vazo servas por boligi akvon.

Ŝajnas al mi ke tian vazon en la angla lingvo oni nomas „kettle”. Speciala formo estas la „fajfkaldrono”, kiu havas pli vastan, iom konusan verŝtubon, fermeblan per kovrilo kiu havas fajftruon, per kiu ĉi tia „kaldrono” avertas kiam la akvo bolas. Ni konstata, ke ni bezonas klaran kaj netan difinon por ĉi tiu vorto en P.V.

^{b)} Vidu ankaŭ *Sc. Rev.* 8, 96-98.

019.941

(048.1)

BIBLIOGRAFIO KAJ RECENZOJ

66-2/-9+66.02/.09 = 30 = 20 = 40 = 60 „1956/1958”

La **ACHEMA-Jahrbuch 1956/1958**, eŭropa katalogo de kemia aparataro, estas kvarlingva (germana, angla, franca kaj hispana) verko 1070-paĝa, redaktita de H. Bretschneider, laŭ komisiono de DECHEMA, la Germana Societo por Kemia Aparataro, en Frankfurt a. Main. Ĝi servos la vizitontojn de la ACHEMA-ekspozicio, okazonta de la 31-a de majo ĝis la 8-a de junio 1958 en Frankfurt a. M., ebligos al ili taŭge sin prepari, informas pri 65 eŭropaj superalernejaj institutoj, kie oni laboras pri kemiaj aparataro, procedotekniko kaj teknologio, informas pri la aĉetebloj de 7 500 tipoj de aparatoj, kaj samtempe estas faka vortaro pri tiom da aparatoj. Ni devas bedaŭri nur, ke Esperanto en ĝi mankas.

Ĉi tiun valoran libron ricevos senpage ĉiu sin anoncinta vizitonto de la ACHEMA ekspozicio 1958. Aĉeto pere de librejo estos ebla nur post la ekspozicio. Informojn koncerne la ekspozicion kaj ĉion kio rilatas al ĝi, petu ĉe DECHEMA, Frankfurt a. M. 7, Rheingau-Allee 25, Germanujo Okcidenta.